

Ludwig Uhland,

La kapelo

tradukita de Manfred Retzlaff

Supre staras la kapelo
 Sur la pinto de la mont',
 La paŝtist' en suna helo
 Ĝoje kantas ĉe la font'.

Triste la sonorileto
 De funebro sonas de
 La altaĵ' tra la kvieto,
 La paŝtist' jam kantas ne.

Ĝin ne povas aŭdi soni
 La gajuloj post viv-fin'.
 Ho, paŝtisto, iam oni
 Portos supren ankaŭ vin.

...

Ludwig Uhland,

La kapelo

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Supre staras sur la monto
 La silenta kapeleto,
 En la valo, ĉe la fonto
 Ĝoje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado
 Nun eksonas tra l' silento, -
 Haltas knabo en kantado
 Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto
 El la valo ĉiu venos.
 Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,
 Oni iam tien prenos.

...

Ludwig Uhland,

Die Kapelle

tradukita de Hans-Georg Kaiser

Droben stehet die Kapelle,
 Schauet still ins Tal hinab.
 Drunten singt bei Wies' und Quelle
 Froh und hell der Hirtenknab'.

Traurig tönt des Glocklein nider,
 Schauerlich der Leichenchor;
 Stille sind die frohen Lieder,
 Und der Knabe lauscht empor.

Droben bringt man sie zu Grabe,
 Die sich freuten in dem Tal:
 Hirtenknabe, Hirtenknabe!
 Dir auch singt man dort einmal.

...

Ludwig Uhland,

La kapelo

tradukita de Hans-Georg Kaiser

Supre tronas sur la monto
 La kapelo en kviet'.
 En la valherbeĵ' ĉe l' fonto
 Ĝoje kantas paŝtknabet'.

Kun funebra sonorilo
 Ektimigas mortkantad'.
 Finas tuj la ĝojjubilo
 De la knabo ĉe l' konstat'.

La ĝojintoj post la morto
 Supren en la tombojn venos
 Paŝtoknabo, laŭ la sorto,
 jen ja Morto vin eĉ prenos.

...

Traduko de la Germana poemo “Die Kapelle” de LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).

Arg-639-1287 (2012-11-02 08:49:45)

Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland.

Traduko de la Germana poemo “Die Kapelle” de LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).

Arg-639-1288 (2012-11-02 16:27:28)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas ankaŭ en www.literaturo.dk/kapelo.htm, ene de la listo <http://www.literaturo.dk/enhavo.htm>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 – †1862-13-11).

Arg-639-1286 (2012-11-02 16:53:38)

Vidu:http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl_l03.html. Pri la poeto vidu la vikipediejon http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland. La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Conradin Kreutzer. La melodio estas aŭdebla tie: <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/drobenst.html>.

Traduko de la Germana poemo “Die Kapelle” de LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).

Arg-639-1290 (2012-11-02 09:10:10)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html>.